



SUDFRANCIA ★ STELO

N°152 - 1a kvaronjaro 2000 - 1^o trimestre 2000 - 10 F

Dulingva bulteno eldonita de la E^o-Federacio de Langvedoko-Rusiljono
Bulletin bilingue édité par la Fédération d'espéranto du Languedoc-Roussillon

Jarabono / Abonnement : 35F al pĉk / au CCP 956-28 P Montpellier



Serena kadro konsistanta el vitejoj, olivarbaroj, veprejo, verdaj montetoj, serpentumanta rivero "Le Vidourle", tia estas QUISSAC, kie la Federacio invitas vin por la PRINTEMPA KONGRESO, sabaton la 8an kaj dimanĉon la 9an de APRILO.

Sabaton posttagmeze (inter la 14a kaj la 18a horo) estos videbla en la socia kaj kultura centro apud la turismoficejo ekspozicio pri esperanto kaj la lingvo-problemo. Samloke dimanĉon ekde la 10a horo ĝis la 13a ni kunvenos por nia jara kongreso.

Esperanto estas ĉies afero. Ni ankaŭ bezonas vin por progresigi nian aferon. Per solidareco kaj kunlaboremo ni certe povas fari bone, pli bone.

Ni tagmanĝos proksime en la restoracio "la kokoriko" (franclingve "Le Cocorico") inter la 13a kaj 15a horo. Kompreneble vi povas ankaŭ pikniki borde de la rivero aŭ aĉeti ion surloke.


Ne forgesu antaŭmendi la tagmanĝon al la kasistino (04 67 71 05 79)^{HR}. La prezo (± 90 F) inkluzivas la vinon, la kafon kaj la bonan etoson de la loko. Povas esti, ke partoprenos Esperantisto el Togolando.

Poste ni aŭskultos parton de registrita debato inter la fama lingvisto Claude Hagège kaj Brian Moon, tradukisto en Luksemburgo kaj membro de la Akademio de Esperanto pri la temo: lingvoj de Eŭropo. Fine ni spektos novajn vidbendojn, la unuan pri la UK de Montpellier (en la franca), la duan kun skeĉoj (en esperanto) fare de la Bretona federacio. Se partoprenos nia samideano el Togolando, la programo kompreneble estos parte modifata. Se vi ne povas veni por la tuta dimanĉo, almenaŭ provu pasigi momenton kun ni.

Ĝis baldaŭ en Quissac !



QUISSAC



OFFICE DU TOURISME
 19 bis, avenue du 11 novembre
 BP 18, 30260 QUISSAC
 ☎ 04 66 77 11 48

KONGRESEJO

RESTORACIO "LE COCORICO"

PLANETO DE LA URBO QUISSAC, RIE DISVOLVIGOS NIA FEDERACIA KONGRESO
DIAMANÇON LA 9AN DE APRILIO 2000

La kongresejo estos en la sama konstruaĵo kiel la turismoficejo.
 La adreso de la restoracio "Le Cocorico" estas : 23 bis, rue du Pont (tel : 04 66 77 39 89)

Niaj malĝojoj



La grupoj de Montpellier kaj Béziers estis trafitaj plurfoje dum la lastaj semajnoj . Fine de Januaro subite forpasis en Montpellier Claude Céliqua, preskaŭ 58jaraĝa . Li fondis pli frue E°-grupon en Mende (48), deĵoris poste en liceoj de Montpellier kaj La Réunion antaŭ ol reveni al Montpellier. Kiel dirite dum la funebra ceremonio, li ĉiam estis arda defendanto de la Homaj Rajtoj . Malaperis tro frue homo kun konvinkoj . Du semajnojn poste forpasis Nicole, 43jara filino de Gesinjoroj Defoly, post doloriga malsano . Al Reine Céliqua, Adrien Defoly kaj iliaj familioj ni esprimas niajn profundajn kondolencojn .

En Marto preskaŭ samaĝe kaj samdate forlasis nin du membroj de la grupo de Béziers . Maurice Authier, eksinstruisto, estis ĉiam trankvila kaj helpema persono . Lia edzino, prezidantino de la grupo, povis ĉiam kalkuli kun lia subteno . Raymond Doury, post kariero en la pariza regiono, venis al nia regiono je la emeritiĝo . Persono kun granda kulturo, li ĉiam estis preta por interŝanĝo de vidpunktoj . Al Suzanne Authier kaj Jean-Pierre Peray, ambaŭ sindonemaj animantoj de la grupo de Béziers, kaj al iliaj familianoj, iras niaj plej elkoraj kaj amikaj sentoj . Esperantistoj ĉeestis la funebrajn ceremoniojn de niaj gesamideanoj, kiuj restos en niaj memoroj . Ankaŭ en Februaro forpasis Géo Junier, fondinto kaj direktoro de la famiĝinta Nacia Esperanto-muzeo en Gray-sur-Saône . Ni omaĝas al lia persista entreprenemo, kiu lasis al ni valoran heredaĵon . Ni esperas, ke la grupo de Gray kaj la esperantistaro kapablos daŭrigi lian verkon kaj ni kondolencas al la familianoj .

Alvoko al Solidareco / Appel à solidarité :

Laŭ ĵus ricevita informo de Hans Bakker, komisiito de UEA por Esperanto en Afriko, kiu, post plurjara klopodado sukcesis trovi staĝejon (en malsanulejo) kaj loĝejon (ĉe esperantista familio) por li, samideano el Togolando, Kossi Logossou, eble restados en Perpignan de la komenco de aprilo ĝis la fino de junio . Eble, ĉar pro la nunaj striktaj reguloj pri enmigrado kaj provizora laboro, nenio estos certa ĝis la envidiĝo . Kossi Logossou estas kamparano sen lerneja edukado, sed li lernis Esperanton rapide kaj bone (jam antaŭ 13 jaroj) . Li eĉ verkis en ĝi . Li deĵoras en loka flegejo/apoteko de katolikaj religiulinoj . Li venos al Francio por plispertiĝi en la profesio kaj en esperanto . Ni antaŭvidas lian partoprenon en la staĝo de Batipaume, aldone al partopreno en la kursoj de la loka E°-grupo (depende de lia horaro) . Eble li vizitos la kunvenon de Quissac, se li jam estos en nia regiono . Se Esperanto iom stagnas ĉe ni, ĝi progresas en iuj malriĉaj landoj . Foje oni povas legi anoncojn pri la unua E°-kongreso en Vjetnamio, en Togolando, en Madagaskaro... La progreso tie dependas ankaŭ de ni . Ni povas ankaŭ konkrete helpi por agrabla disvolviĝo de la restado de nia samideano . En epoko, kiam oni parolas pri indiferenteco kaj rasismo, ni montru, ke ĉe la Esperantistaro regas alia sistemo de solidareco kaj amikeco . Kiel ? Per invito al Kossi viziti vin aŭ vian grupon por prezenti sian landon aŭ simple interkonatiĝi kaj praktiki la internacian lingvon, per donaco de materialo por lerni aŭ instrui esperanton, per financa subteno (por partopreno en la staĝo, por vizitoj al nia regiono, por uzo poste en sia lando, ktp) . Rilatu kun la federacio, se vi iel pretas ion fari . Anticipan dankon nome de solidareco . *Kossi Logossou, espérantiste du Togo, sera peut-être dans notre région (à Perpignan) pour un stage de trois mois à partir de début Avril (si toutes les formalités sont réglées). Si vous pouvez nous aider à rendre son séjour agréable (invitation, participation au stage de Batipaume, don de matériel pour l'étude de l'espéranto ou soutien financier, contactez la fédération : adresse en dernière page, n° de CCP en première page). L'espéranto est l'affaire de chacun de nous . Merci à l'avance !*

Pri la kongreso de Quissac por Retanoj / Pour les internautes :

Notre jeune correspondant local Mikaelo se tient à votre disposition pour renseignements.


Voici ses précisions : J'ai créé une adresse électronique avec www.netcourrier.com

Pour lire le courrier de cette boîte au lettre électronique allez sur le site : www.netcourrier.com

Dans le cadre "vous avez déjà accédé à Netcourrier" entrez dans le case "adresse netcourrier.com" :

regiona.kongreso (c'est le nom du compte). En dessous dans la case mot de passe : tapez **078923**

CLiquez sur ENTRER. La boîte au lettre s'ouvre, on vous informe, par exemple : vous avez 2 messages dont 1 nouveau. Pour lire le courrier cliquez sur le parchemin en bas de ma page.



Le Restaurant "Le Cocorico" où nous déjeunerons **le dimanche 9 Avril** n'est pas une "auberge espagnole" .

Le menu à 75 F (+ boisson et café, donc environ 90 F en tout) comprend : **Coquille aux fruits de mer, Gardianne de taureau, fromage, dessert** .

Veillez réserver à l'avance chez notre trésorière,

Mme Négron 04 67 71 05 79 (aux heures des repas SVP).

Si l'un des plats ne vous convient pas, elle vous proposera une alternative.



VIVO DE LA GRUPOJ

BEZIERS

Datoj de la venontaj kunvenoj: samloke, samhore: 8a de aprilo; 13a de majo; 17a de junio.

Notu bone ke la 8an aprilo okazos la monata kunveno kaj la 9a de aprilo, en Quissac, okazos la federacia kongreso. PARTOPRENU EN AMBAŬ.

En la kunveno de 17a de junio, ni elektos la datojn por le venonta sezono. Do grava kunveno. Ĉeestu.

Verŝajne, fine de junio (25a?), kiel kutime, ni kuniĝos subĉiele. G. Santos proponis al ni pikniki en la bela ĝardeno de Campagnan. Ni fine elektos la daton en la kunveno de la 17a de junio.

STAĜO

Antaŭ kelkaj semajnoj, ni eksciis, ke J. Vincent sufiĉe malsanas, kaj ŝi ne povos gvidi la 3a-gradan kurson. Nina Korjenezskaja, rusdevena, anstataŭos ŝin. Certe, vi rememoras pri la remarkindaj prelegoj, kiujn ŝi prezentis ĉe ni antaŭ 4-5 jaroj. Bonega esperantistino ŝi estas kaj certe la staĝanoj aprecos ŝin. Ŝi prezentos ankaŭ prelegojn okaze de la vesperoj. Bonvenon al ŝi.

La grupo de Angoulême organizas prelegturneon de ĉina paro. Ni invitis tiujn eksterlandanojn prelegi 2 fojojn en Agde: 1 foje en Batipaume, alian fojon en Agde por la ekstera publiko (alia temo). Ni provas sukcesi havigi al ni "senpagan" salonon. Espereble, la geĉinoj ne renkontos administrajn malfacilaĵojn por eniri en Francion. Do, la staĝo (30a de majo-6a de junio) prezentiĝas tre alloga. Ne prokrastu por aliĝi. Vi ne bedaŭros.

Lastminute: povas esti, ke Kossi Logossou el Togolando, partoprenos la staĝon; do, ĉi-jare, la etoso estos vere internacia. Kial ne partopreni?

La 8a de marto: konferenco de Thierry SALADIN. Kelkaj personoj ĉeestis.

MONTPELLIER

INTERNACIA SEMAJNO ĈE MEDITERANEO, EN SETE.

Kiel anonciĝis, nia 26a Internacia Semajno okazos kiel kutime en la feriejo "Le Lazaret", en Sète, de la 26a de aŭgusto ĝis la 2a de septembro (tio estas de la lasta sabato de aŭgusto ĝis la unua sabato de septembro). Sed ĝi proponas novaĵon. Atilio Orellana Rojas gvidos Seminarion B de la metodo Ĉe, tio por tiuj kiuj jam sukcesis la seminarion A.

CENTRE CULTUREL ESPERANTO DE MONTPELLIER

PROKOKOLO DE LA ĜENERALA JARA KUNVENO kiu okazis la 6an de januaro kaj la 3an de februaro.


Ĉeestis 11 homoj kaj 4 prokuroj estis registritaj. Elekto de komitatanoj: Yvette VIERNE kiel Prezidantino, Frédéric DURAND kiel Kasisto, Jeanne BES kiel Vic-kasistino, Louis ENSUQUE kiel Sekretario, Rosa AUMEUNIER -RASPALL kiel Vic-sekretariino. La ĉeestantaro unuanime aprobis tiun estraron.

Venontaj kunvenoj: 06-04-2000 Pierre MARTINEZ enkondukos paroladon pri parkoj kaj ĝardenoj en Montpellier. 04-05-2000: Tramoj iamaj, ĉiaj kaj ĉieaj. 08-06-2000: Feri-kaj vojaĝ-projektoj.

Ne forgesu la federacian kongreson kiu okazos la 9an de aprilo en **QUISSAC, kunorganizitan de junuloj.**

La 9an de marto 2000 je la 18a en la "Domo Escoulaire" okazis la monata kunveno. Ĉeestis 14 partoprenantoj. Sinjorino CAYZAC prelegis pri astronomio. Pere de sia filo ŝi interesiĝas al tiu temo: observi la ĉielon per teleskopo! Unue ŝi aliĝis al la klubo de sia vilaĝo Le Crès; due ŝi partoprenis en la Nova Esperanto-Klubo kun aliaj amatoroj de la kosmo. Ŝi konigis al ni la kreadon, komence de jaro 2000, de l'Astronomia Esperanto Klubo sur interreto.

Por ilustrati la prelegon, ~~Hana~~ Hana CAYZAC montris belegajn kaj multkolorajn lumbildojn pri nebulozoj, galaksioj... Tiuj lumbildoj montris la gravan centron en Hawai.



**"Sudfrancia Stelo" briletas (!?) Aliaj steloj brilas, eĉ brilegas...
NOVA SCIENCA KLUBO EN ESPERANTUJO !**

Je la komenco de la jaro 2000 fondiĝis en Esperantujo "Astronomia Esperanto-Klubo". Ĝiaj anoj (ĉu profesiaj, ĉu amatoroj, ĉu scivolemuloj) havas unu solan pasion : esploron de Universo . Ili volas scii multe pri ĝi, pri ĝiaj leĝoj, procezoj kaj mirakloj . Por komunikado ili elektis la plej demokratecan lingvon -Esperanto kaj la plej rapidan rimedon -Interreto . Vizitu Astronomian Esperanto-Klubon laŭ la adreso :

http://members.xoom.com/astro_esp Post dumonata agado la klubo jam havas multajn interesajn kaj vizitindajn rubrikojn, i.a : "Profesia rondo", "Amatora rondo", "Astrofotogalerio", "Biblioteko", "Astronomia Terminaro", "Anonc-tabulo", "Nia teamo", "Demandu specialiston", al kiuj kontribuas AEK-anoj de Israelo, Brazilo, Usono, Francio, Hispanio, Italio, Germanio, Anglio, Slovakio kaj Irlando.

Raportis Hanna Cayzac (Montpellier) : cayzachanna@netcourrier.com

Se vi ŝatus scii iom pli pri astronomio, vi povas kontakti Hanna Cayzac aŭ partopreni staĝon en Bouresse (regiono de Poitiers) ekde la 5a de septembro. Tiun staĝon gvidos Patrick Lagrange (inicado kaj praktiko). Ankaŭ dum la Hispana kongreso de esperanto en San Sebastián de Los Reyes (urbeto apud Madrido) de la 29a de aprilo ĝis la 1a de majo, prelegos astronomo David Galadí-Enríquez (programo de tiu kongreso ĉe <http://www.esperanto-es.org>)

REINSERTION ET ESPERANTO

Zora kaj Mélika partoprenis fine de februaro, staĝon en Bouresse kun G. LAGRANGE pri tradukado. Plej malfacile estis la tradukado de esperanto en la francan kaj ne inverse.

Dum tuta semajno, ili prezentis esperanton al diversaj klasoj de la kolegio "les Oliviers" en Nîmes. Kursoj estis antaŭviditaj.

Daŭre funkcias la intensivaj kursoj en Montpellier. La 13an de marto, prelego en I.U.F.M. Thierry SALADIN prezentas nun la projekton "Réinsertion et Espéranto" en diversaj urboj en Francio.

LOZERE

ESPERANTO EN "MIDI LIBRE"

Post apero de reklamo pri esperanto en la ĵurnalo "Midi Libre", iu ĵurnalistoj de tiu gazeto faris reportaĵon pri la korespondado en esperanto de du Lozeranoj kun Ĉino de Chengdu (vidu p. 6 muntaĵon en reduktita formato) .

AUDE

Ni ĝojas pro la fakto, ke JORGOS denove loĝas en L.R. tamen je la limo kun Ariège (en Lafage). En Lérans funkcias nova kurso . Gratulojn al nia samideano kaj la gekursanoj !

PERPIGNAN

Conférences et articles de presse

Interrogé par une journaliste, Thierry SALADIN est venu annoncer sa conférence et présenter sommairement l'ESPERANTO sur les ondes de Perpignan-Roussillon, samedi 15 janvier 2000 à 12h45.

Le journal l'"Indépendant" du 17 janvier 2000 a consacré un article sur l'ESPERANTO à l'occasion d'une conférence du docteur Thierry SALADIN. Il est regrettable de constater, une fois de plus, que la plupart des journalistes qui font des articles sur l'ESPERANTO montrent leur incompétence ou commettent une erreur d'analyse. Nous avons intérêt à leur fournir un texte ou des documents lors de leur reportage. Ainsi pour cet article où il est faux de dire que l'ESPERANTO n'est pas parlé en Corée du Sud alors que l'on trouve un site esperanto dans une université de Corée du sud, que le Président de l'association universelle d'esperanto a été l'économiste coréen Chong Yeong Lee et que le dirigeant de DAEWOO a publié un livre en ESPERANTO (et deux de ses voitures portent un nom en ESPERANTO: ĈIELO et ESPERO). De même, en Irak, il y a des espérantophones mais les dictatures ont interdit leurs activités. Jean AMOUROUX, de Perpignan, a fait la rectification dans le courrier des lecteurs de ce journal.

F.B.

Chengdu offre ses vœux avant l'année du Dragon

Monique et Francis Bernard correspondent avec le Chinois Mu Binghua

■ Grâce à l'Esperanto, l'Honorable Mu Binghua, de Chengdu, a lié des relations épistolaires des plus chaleureuses et suivies avec Monique et Francis Bernard, un couple d'enseignants qui ont choisi la Cause Méjean pour vivre en toute sérénité le temps d'une retraite qu'ils veulent active. Les vastes horizons et la majesté des lieux choisis par ces deux ex-professeurs de français leur permettent de se donner et s'adonner totalement à la promotion de l'Esperanto, langue universelle s'il en est une !

Actuellement, sur l'étendue de la planète, on dénombre près de quatre millions d'Espérantistes qui pratiquent de façon plus ou moins assidue cette langue "inventée" par le linguiste polonais Zamenhoe.

Le Languedoc-Roussillon, précise, Monique Bernard vice-présidente de la fédération, compte trois cents membres actifs... Autant dire que cette vaste région demeure un territoire encore en friche pour les "Espérantistes" !

- ▶ **Trois cents membres sur le Languedoc-Roussillon**
- ▶ **En lien avec Mu Binghua, prof de maths en Chine**
- ▶ **An 2000 occidental et année du Dragon chinoise**

A l'image des pays européens, la Chine, elle aussi, s'intéresse à l'Esperanto. Contrairement à ce que l'on pourrait croire au regard de ses réflexes répressifs, le gouvernement de Pékin est assez libéral pour permettre et même aider financièrement la diffusion de l'Esperanto. Plusieurs émissions de télévision ainsi que la revue mensuelle "La Chine populaire" reflètent ce besoin d'ouverture qui anime la jeunesse universitaire de ce vaste territoire oriental.

De ce besoin d'ouverture dans tous les domaines, l'honorable Espérantiste Mu Binghua est en quelque sorte la victime indirecte !

Professeur d'économie socialiste, il dispensait initialement des cours à l'Université de Chengdu, capitale du Sichuan (peuplée de 1 700 000 habitants).

Mais voilà, ses étudiants, séduits par la nouvelle "économie de marché" qui s'est infiltrée au-delà de la muraille de Chine, ont déserté ses cours d'un autre âge qui,


du coup, ont été supprimés. Plus d'élèves, plus de poste ; actuellement, grâce à des amis bienveillants, il est devenu enseignant en mathématiques dans un collège de la ville.

Désormais, pour arrondir ses fins de mois (l'équivalent de vingt francs par journée de cours, bagatelles !) Mu Binghua rédige des articles sur son pays à l'attention de publications espérantistes internationales qui paraissent également sur Internet. Chengdu, capitale de la province du Sichuan, est située dans une des plaines les plus riches et peuplées de Chine. Ancienne capitale du royaume de Shu, elle a conservé sa structure ancienne de forme carrée, aux rues octogonales. Abritant de nombreux temples, la vieille ville est entourée d'une muraille crénelée de vingt kilomètres de longüeur.

Longtemps surnommé le "Petit Pékin", Chengdu est actuellement une capitale industrielle importante et un carrefour économique de liaisons ferroviaires avec le reste des provinces. De cette métropole part également la grande voie routière qui conduit à la frontière du Tibet.

Etrange destin en conséquence pour ces liens d'amitié qui relient, par Esperanto interposé, le Cause Méjean (même pas deux habitants au kilomètre carré) au pays le plus peuplé de la planète.

Une merveilleuse aventure que le nouveau millénaire (qui, rappelons-le scrupuleusement, ne commencera qu'en 2001)



Bondezirojn por la jaro 2000...

va très vraisemblablement multiplier grâce aux disciples zélés de Zamenhoe. Avec ses meilleurs vœux pour notre an 2000, Mu Binghua fait savoir à Monique et Francis Bernard que son pays va édifier prochainement le monument du siècle, d'une hauteur de quatre-vingt cinq mètres, il reposera sur une base de trente-cinq mille mètres carrés et sera dédié à cinq mille ans de civilisation chinoise. Autre événement festif pour Mu Binghua : la célébration du nouvel an chinois qui débutera sur notre calendrier occidental le 9 février prochain. Il est placé sous le signe du Dragon et laisse entrevoir une année de feu. Bien sûr, Mu Binghua recevra à son tour les vœux de ses amis et correspondants du Méjean.

Les vœux s'exprimeront en ces termes : « Bondezirojn por la jaro 2000 ». En Esperanto dans le texte. ●

1. Se vi manĝos en feriejo "Le Lazaret" :
ĉu vi estas vegetarano? Jes Ne
1. Si vous mangez au « Lazaret »
êtes vous végétarien? Oui Non

2. **Mi sekvos la kurson**
2. Je m'inscris au cours suivant

-por komencantoj
(pour débutants)

-paroligan kurson
(cours 2ème degrés)

-perfektigan kurson
(cours de perfectionnement)

-Seminarion B de la Cseh-metodo

INTERNACIA SEMAJNO ESPERANTISTA

La Kultura Centro de Montpellier proponas al vi lerni aŭ perfektigi vian scipovon pri Esperanto.

Profitu, samtempe trapasi agrablajn feriojn en la haven-urbo SETE, en ripoza parko de pluraj hektaroj ĉe Mediteranea bordo, dum ideala periodo pro la bona vetero sed ekstere de la somera troa homamaso.

Ĉe ni vi ĝuos plurnivelajn kursojn kaj ankaŭ...banadon, fiŝkaptadon, ekskursojn kaj...bonan manĝaĵon.

SEJOUR LINGUISTIQUE AU BORD DE LA MER

Le Centre Culturel Espéranto de Montpellier vous propose d'apprendre ou de vous perfectionner en Espéranto.


Profitez-en pour passer en même temps d'agréables vacances à SETE, dans un parc reposant de plusieurs hectares au bord de le Méditerranée pendant une période idéale jouissant d'un temps excellent et en dehors de l'afflux estival.

Chez nous vous pourrez suivre des cours de plusieurs niveaux mais aussi profiter de baignades, pêche, excursions et... bonne nourriture.

Internacia
Semajno



ce



mediterranea

26ème SEMAINE INTERNATIONALE D'ESPERANTO

26a INTERNACIA SEMAJNO DE ESPERANTO

26-08-2000

"LE LAZARET"

02-09-2000

SETE (FRANCIO)

26a INTERNACIA ESPERANTO SEMAJNO

26ème SEMAINE INTERNATIONALE D'ESPERANTO

SETE (FRANCIO) : 26-08-2000 / 02-09-2000

ALIĜILO

BULLETIN D'INSCRIPTION

Adresse pendant la semaine

Adreso dum la semajno

Maison Familiale "Le Lazaret"
La Corniche 34200 Sète (Francio)
tél.: 04 67 53 22 47

Programme.....

Programo

Matinée : Cours de plusieurs niveaux
Matene : Diversnivelaĵoj kursoj
Après-midi : excursions, cours ou temps libre
Posttagmeze : ekskursoj, kursoj aŭ libera tempo
Soirée : programme culturel ou divertissements
Vespere : amuzaj, distraj kaj kulturaj programoj

Excursions.....

Ekskursoj

Nombreuses possibilités sur place
Multaj eblecoj surloke

Adhésions.....

Aliĝkotizoj

250 FF avant le 1er juin
250 FF antaŭ la 1-a de junio
350 FF après cette date
350 FF post tiu dato
gratuit pour les jeunes de moins de 26 ans
senpaga por gejunuloj malpli ol 26 jaraĵoj

Logement : plusieurs possibilités

Loĝado: pluraj eblecoj

a/ Au "Lazaret", les prix sont les suivants pour une semaine

En la feriejo, jen la prezoj por unu semajno

1 personne dans une chambre d'une personne : 1700 FF
1 persono en unupersona ĉambro : 1700 FF

1 personne dans une chambre pour 2 personnes : 1410 FF
1 persono en dupersona ĉambro : 1410 FF

1 personne dans une chambre familiale : 1410 FF
1 persono en familia ĉambro : 1410 FF

Les prix comprennent la chambre et 3 repas par jour.
La prezo entenas loĝadon kaj tri manĝojn tage.

La maison est adaptée aux personnes utilisant des fauteuils roulants.
La feriejo taŭgas por rulseĝuloj.

La prezoj duoniĝas por la loĝantoj de la landoj kategorio B de UEA.

kondiĉe ke ili parolu flue Esperanton kaj prelegu pri io.

Réservation du logement.....

Mendo de loĝado

Valable après paiement d'un acompte de 400 FF
Validas nur post antaŭpago de 400 FF

b/ Possibilité de camping

Eblas tendumi

c/ Des hôtels sont aussi à votre disposition.

Ankaŭ hoteloj estas je via dispono

Date limite d'inscription.....

Limdato por aliĝo

15-07-2000

Inscriptions, renseignements, réservations

Klarigoj, Aliĝoj, Mendoj

ESPERANTO-5, Rue du Docteur Roux, FR 34090 MONTPELLIER-Francio, Tel : 04 67 54 15 43

Familia NOMO.....

(Nom)

Persona NOMO.....

(Prénom)

Adreso.....

(Adresse).....

Tel.Num.....

(n° de tel.)

(*) Mi loĝos en la feriejo "Le Lazaret"

(Je logerai à la Maison « Le Lazaret »)

(*) Mi antaŭmendos unu liton :

(je réserve un lit)

(*) en unupersona ĉambro

(dans une chambre pour une personne)

(*) en dupersona ĉambro

(dans une chambre pour deux personnes)

(*) Mi ne loĝos en la feriejo "Le Lazaret", sed mi manĝos regule.

(Je ne logerai pas à la Maison "Le Lazaret" mais j'y mangerai régulièrement)

* : forstreku la neutilan linion

(rayer la mention inutile)

Sendu la aliĝilon:

ESPERANTO

5 rue du Docteur Roux

FR 34090 MONTPELLIER.

Pagu al : CENTRE CULTUREL ESPERANTO

Poŝta ĝirkonto en Francio :

CCP N-o 2361 61 T Montpellier

ATTENTION !!! Bonvolu aldoni koverton kun via adreso
(ATTENTION !!! Veuillez joindre une enveloppe avec votre adresse)



Toulouse : 5-9 Julio

Progresas la preparlaboroj de la festivalo . Post la kunveno de la 25a de Marto, ŝajnas, ke la programo estos preskaŭ definitiva . Jen la nomoj de artistoj, kiuj estis kontaktitaj :

Jomart kaj Nataša (Stockholm), Kajto (Nederlando), Emily Barlaston (NL) Jacques Yvart (F), Persone (Svedio), Solotronik (Malaga), Jomo (Tuluzo), La Kompanoj (Bordozo), Ĵak Le Puil (F), Kaj Tiel Plu (Barcelono), Ibere Libere (Hispanio), Footeuses de Oaï (Tuluzo), Arnau Torras (Barcelono)...

Kiel vi vidas, **internacia kaj diversa paletro, io por ĉiu gusto...**

La antaŭvidita "Canto General" (ĥoruso de cent personoj, muziko de Theodorakis, poemoj de Neruda) ne povos okazi pro teknikaj kialoj . Anstataŭe disvolviĝos kantstaĝo kun koncerto fine, laŭ la temo : "Homaj Rajtoj, Paco, Libero" . Samtempe okazos renkontiĝo de korusestroj . La kunordigantino estas Zdravka Bojĉeva el Bulgario . Dum la 5 tagoj oni planas ankaŭ diversajn atelierojn, ekskursojn, ktp . Informoj ĉe SFS .

"Pasporta Servo 2000" : celo atingita

Per "Pasporta servo" vojaĝantaj esperantistoj, kiuj posedas la adreslibron, rajtas je senpaga tranoktado ĉe la gastigantoj. Gastigantoj ricevas la libron senpage, aliaj povas aceti ĝin. En 1999 la libreto nombris 945 adresojn; la celo estis simbole superi la nombrojn 1000 por la jaro 2000 . Fakte ĉi-jare la ĵus aperinta listo de gastigantoj enhavas **1075 adresojn (+13,7%) en 76 landoj** (vidu la reton en suda Francio dekstre) . Plej multe da gastigantoj estas en Rusio (91), la metropolo de PS estas Multan en Pakistano, kie 17 gastigantoj atendas vizi-tantojn . Ĉu vi ne pretus aldoniĝi al la listo por helpi junajn geesperantistojn vojaĝi, konatiĝi kun la mondo, praktikante esperanton ?



Paroles de ministres

Sept parlementaires de 5 partis politiques avaient déposé une question écrite sur l'introduction de l'espéranto comme matière optionnelle au baccalauréat . Vous aviez peut-être vous-mêmes participé à la campagne de pétitions . Voici la réponse de M. Allègre, parue au J.O. du 10 Janvier :

"Quarante quatre langues vivantes étrangères peuvent être choisies par les candidats au baccalauréat, au titre des épreuves obligatoires ou facultatives . Avec un tel éventail, le système éducatif français est l'un de ceux qui en Europe et dans le monde proposent aux familles les choix les plus ouverts. Il permet notamment, au travers de l'enseignement de l'anglais, de l'allemand et de l'espagnol qui sont les trois langues les plus communément étudiées par les élèves au collège et au lycée et les plus fréquemment choisies par les candidats au baccalauréat, de rendre plus aisée la communication au sein de l'union européenne et dans le monde . Cet éventail représente par ailleurs une très lourde charge en termes d'organisation de l'examen qu'il ne saurait être question d'accroître par l'ajout d'épreuves supplémentaires."

Pas de doute, nous sommes les meilleurs et ceux qui prétendent que la communication a des ratés se trompent . Quant aux 44 langues évoquées, un décompte officiel mentionne 50 options, dont 32 langues (20 nationales et 12 régionales) . Même s'il n'est pas nécessaire d'espérer pour entreprendre (des démarches), cette réponse a un goût de déjà vu et l'espéranto est toujours la langue de trop . En 96, le Ministère de l'Éducation utilisait le même prétexte et parlait de 21 langues étrangères au bac . S'ajoutait alors l'argument non retenu cette fois du manque de "supports littéraires, historiques et géographiques comparables à ceux d'une langue classique ou vernaculaire" . N'est pas mentionnée non plus la priorité donnée à la réciprocité avec les autres langues de l'union européenne . Par contre, on tente de nous culpabiliser en évoquant "une très lourde charge" (financière ?) pour l'organisation de l'examen . Il semble que sur d'autres charges on soit moins regardant au ministère !

Le J.O. du 1^{er} Février (www.journal-officiel.gouv.fr) rend compte dans le détail d'une intervention à l'Assemblée Nationale de M. Myard, député . Ce dernier rappelait que "il ne se passe pas une semaine sans que /.../celles et ceux qui ont pour devoir de défendre notre langue la bafouent et la trahissent" et de donner quelques exemples . Il demandait au Premier Ministre quelles mesures il comptait prendre "pour que l'on puisse vivre et travailler en France en parlant français" . M. Josselin (ministre délégué à la coopération et à la francophonie), répondant à la place de M. Jospin, affirmait qu'il y avait dans les pays anglophones "une grande appétence du français" et qu'il était rappelé régulièrement "aux fonctionnaires qui dépendent du gouvernement/.../ qu'ils ont à s'exprimer en français chaque fois que ce dernier est une langue de travail" .

Quand on vous disait que nous sommes les meilleurs et que tout va bien ...

J.H.

Koara Eŭrop-Unia Esperanto-kongreso

En Oostende (Belgio) : 27a aprilo - 1a majo 2000


Alta protektanto : Albert IIa, Reĝo de la Belgioj

Al la kongreso jam aliĝis pli ol ducent personoj el 16 landoj, do ĝi vere estos internacia.

Ekde la komenco de la jaro ĝis la fino de la kongreso, la poŝtoficejo de Oostende uzas specialan filatelan poŝtstampilon. Dum la daŭro de la kongreso 50 E°-flagoj (1m x 1,50m) flirtos en la urbo (samformataj flagoj aĉeteblaj dumkongrese je favora prezo de 37,18 Eŭroj). La tri temoj de la kongreso estos : Eŭropa Unio (kun vizito al la Eŭropa Parlamentejo en Bruselo kaj prelego de Zlatko Tišljariĉ pri "Eŭropa identeco, ideologio kaj lingvo", Monda edukado (kun ligo al la interreto helpe de la Instituto pri Edukado de Oostende por viziti la virtualan lernejon "Tibor Sekelj") kaj Ekologio, ŝlosilo de la tria jarmilo (filmo pri kaj vizito al la kompoŝtejo, informbudo kaj demonstrado de la Ekologia Centro de la Marbordo) . Dum la kongreso mara boatekskurso per la ŝipo Seastar (Marstelo), prelegoj pri "Delfenoj kaj Balenoj en la Norda maro", "Ili vivis sur la tero" (okjara mondvojaĝo de B. kaj M. Robineau), vizito al la plenaera muzeo "Atlantikwall" en dunoregiono, bankedo kun elekteleco inter tri menuoj, ktp. Alloga kongreso surpapere, pri kiu raportos la partoprenontaj federacianoj .

Puraj trotuaroj en Oostende (artikolo aperinta en "Midi Libre")

Oostende, kosmopolita "reĝino de la banurboj", estas frekventata de aĝaj personoj, kiujn ofte akompanas kvarpiedaj estuloj (gehundoj), kies fekaĵoj ne estas bona reklamo. Ĉar monpunoj ne sufiĉis, urba konsilano proponis kapti la kulpajn hundojn kaj ilin vendi, kiam monpunoj ne estos pagataj . Protestis asocio por defendo de bestoj. Ĉu la trotuaroj de Oostende estos puraj en Aprilo ?




UNIVERSALA KONGRESO EN ISRAELO

TEL-AVIV : 25a de Julio / 1a de Aŭgusto 2000

La UK registris fine de februaro 778 aliĝintojn el 49 landoj . Pinte de la statistiko staras Germanio (95), Japanio (79), Francio (59), Israelo (57), Pollando (55), Nederlando (48), ktp . Antaŭvideble partoprenos ĉirkaŭ 1200 personoj, kiel en Adelaide (Aŭstralio) antaŭ tri jaroj, kvankam por Eŭropanoj la distanco estas multe malpli longa .

Renato Corsetti, estrarano de UEA, skribis : " Strebado por konservi pacon estas unu el la gravaj elementoj de la agado de esperantistoj .// La debatoj dum la UK ebligas senkaŝan komparon de vidpunktoj (pri la situacio en Israelo) . Se vi partoprenos, vi havos la eblecon ankaŭ renkonti la alian flankon, la Arabojn kaj en Israelo kaj ekster ĝi . Ĉirkaŭ la kongreso estas pluraj eventoj, kiuj ebligas al la kongresanoj kompari la vidpunktojn de la du flankoj . Nia deziro estas, ke la esperantistoj kontribuu per sia ĉeesto kaj per siaj ideoj al la pac-procedo, kiu, preskaŭ kiel la E°-movado mem, stagnas antaŭeniras . Ni estos tie por diri, ke tiu procedo devas antaŭeniri .// Vi eble memoras, ke en Montpeliero, vi decidis, ke E° estu ponto en ĉiuj komplikaj situacioj, ankaŭ inter la nordo kaj la sudo . Tio en la Meza Oriento ekokazas inter mil malfacilaĵoj . Venu por helpi ankaŭ pri tio, kio en sia maniero estos originala kontribuo al la pac-procedo" .

Josef Šemer , Israelano, kiu bone konas Francion, skribis siaflanke : "La ĉefa kaŭzo de la hezitado de multaj esperantistoj estas// la timo pro malsekura stato, kiu regas en Israelo// . Israelo aperas ĉiutage en la tutmonda amaskomunikilaro ligita al "milita stato"//(sed) la stratoj en Tel-Aviv estas same sekuraj kiel tiuj de Roterdamo kaj eble eĉ iom pli sekuraj ol tiuj de Parizo, Madrido kaj Londono .//Mi loĝas tie, kaj mi certigas vin, ke jam de tri jaroj neniu bombo eksplodis, kaj ankaŭ en antaŭaj jaroj oni povas nombri per fingroj de unu mano la atencojn okazintajn en tiu urbo" .// (Tiu), kiuj partoprenos la UK-on de E°, kies ĉeftemo ja estas "Lingvo kaj kulturo de paco", aldonos plian voĉon al la ĥoro, kiu subtenas tiun formiĝantan pacon . Ili venu "per flugiloj de facila vento", vento somera, mediteranea kaj... sekura ! Ĝis la revido en Tel-Avivo, karaj eksterlandaj geamikoj !"



Dans la presse, sur le problème des langues

De nombreux articles sont parus dernièrement sur le sujet. Quelques extraits :
 - "Valeurs Actuelles" du 4/2 a réalisé une enquête sur les entreprises, intitulée "la langue française au chômage" : faudra-t-il bientôt parler anglais pour être recruté, en France, dans une entreprise française ? Ci-contre, lettre d'un lecteur, passablement expurgée...

- "Ca m'intéresse" de février a publié un long article : "le français a-t-il encore un avenir ?". A remarquer une analyse de Claude Duneton : "comme toujours, ce sont les élites qui font le jeu de l'anglicisation de la France ; un peuple qui perd sa langue devient colonisé". Ainsi en fut-il autrefois, d'après lui, de la langue occitane.

- "Courrier International" du 24/2 a choisi comme couverture le titre "Sos langues en péril". Ce numéro parle en détail des 50 millions de personnes de l'union européenne qui utilisent autre chose que l'idiome officiel de leur pays et affirme que la diversité des langues est un atout pour l'humanité. Dans un article de deux pages, le linguiste David Crystal signale que dans cent ans la moitié des 6000 langues existantes aura disparu (en moyenne une langue tous les 15 jours !). Envisageant une langue commune, il cite "l'anglais, l'espéranto ou autre chose". Dans le n° suivant de CI est parue une mise au point de Edmond Ludwig que si l'anglais est glottophage (supprime les autres langues), l'espéranto les protège. Un argument que nous devons utiliser plus souvent.

- "Le Monde" du 27/2 s'est penché sur l'enseignement des langues en France. "L'hégémonie de l'anglais et de l'espagnol se renforce" (voir graphique ci-dessous), "les spécialistes s'en sont inquiétés à Expolangues". "Dans le primaire, l'apprentissage des langues est limité par manque de personnels qualifiés". Cet article doit être complété par les conclusions du colloque sur les langues vivantes, tenu par le SNES en novembre 99, conclusions nettes sur le recul des langues dans le système éducatif (texte de la pétition disponible sur demande).

- "Courrier International" du 1/3 prétendait que le 21^e siècle serait hispanique : quart des USA hispanophone + renaissance de l'Espagne + influence grandissante de l'Amérique latine.

- "Le Nouvel Observateur" du 9/3 a publié un article choc : "sans l'anglais, t'as plus rien !", au sujet des cadres ne maîtrisant pas une langue étrangère. Avec un sous-titre : "c'est le nouvel espéranto de la mondialisation". Nous avons bien sûr contesté ces affirmations. Sur les pages qui suivaient cet article, un témoignage réussi en Italie... par l'italien. "L'anglais, c'est pas tout !".

Les autres langues aussi ouvrent d'autres horizons, même en économie. Bien sûr, l'espéranto ouvre tous les horizons ! A nous d'en témoigner.

Cette rubrique est aussi la vôtre. faites-nous part de vos remarques et points de vue. Transmettez-nous les articles de presse qui traitent des problèmes de langues et, si possible, n'oubliez pas d'y répondre (rebat) personnellement !

"USA TODAY" (Usono hodiaù)

Sur le site www.usatoday.com a paru fin janvier un article bien documenté, intitulé "une croyance religieuse en l'espéranto" sur l'emploi de la langue internationale dans la religion catholique où le besoin d'un nouveau latin se fait sentir. Seule fausse note : l'avis d'un linguiste suivant lequel l'espéranto est quelque chose de supplémentaire à apprendre. Bien sûr, il s'agit d'un anglophone qui considère peut-être que l'apprentissage de sa langue n'est pas une tâche supplémentaire pour les non-anglophones...
 A Taizé, centre de rencontres connu où 100.000 jeunes de 80 pays se retrouvent chaque été, se déroulera du 13 au 20 Août le 4^e camp oecuménique de jeunes.
 Contact : B. Eichkorn, Romeusring 20, DE 78050 Villingen

Déclin du français

Défaitisme et snobisme


► J'espère que vous complétez un jour votre enquête sur la langue française au chômage, dont vous ne traitez qu'une partie. Anglais, langue du *business* : difficile à contester, mais il n'y a pas que la finance. Même M. Allègre, qui préconisait le tout-anglais, alors que notre environnement européen est plurilingue, s'inquiète maintenant de « cette extraordinaire machine d'invasion intellectuelle que constituent désormais les Etats-Unis » (document de l'Assemblée nationale). Empire colonial britannique, relayé par l'émergence des Etats-Unis plus mondialisation unipolaire avec américanisme expliquent l'essentiel. Ajoutons-y le comportement de ceux qui représentent la France et utilisent l'anglais, même lorsque le français est langue officielle (Onu, OMC, Kfor, instances européennes). M. Sautter a tenu sa première conférence de presse en anglais, à cause de la presse internationale présente.

Ce défaitisme, mâtiné d'opportunisme et de snobisme, atteint même la création artistique (Luc Besson et sa *Jeanne d'Arc* tournée en anglais, Lara Fabian et son dernier album tout en anglais). Trop, c'est trop ! N'utilisons l'anglais que lorsque c'est indispensable. Si nous, Français, n'utilisons pas le français, qui voudrait l'apprendre ?


J. Hénin, La Canourgue.

Les langues vivantes dans le second degré

LA PREMIÈRE LANGUE
en % des élèves de 6^e



LA DEUXIÈME LANGUE
en % des élèves de 4^e



Source : MEN

L'ESPERANTO A PART ENTIERE SUR INTERNET

Les sites internet communiquant en ESPERANTO se multiplient de façon très rapide au rythme du réseau mondial de communication. C'est ainsi qu'on peut désormais pratiquer des échanges commerciaux en se connectant sur le site <http://komerco.com>.

De leur côté, les enseignants peuvent s'intéresser à un vaste projet concernant 80 classes de nombreux pays. Ce projet, dirigé par le Pr. MAURO LA TORRE, du département des Sciences de l'Education de l'Université de Rome III et un comité international d'universitaires vise à développer chez les jeunes, outre l'apprentissage linguistique proprement dit, les connaissances des différentes cultures avec l'élaboration en commun de documents à thèmes variés.

PAROLAS VARSOVIO EN ESPERANTO

La 4an de aprilo 1999 la E. Elsendoj de Pola Radio atingis la aĝon de 40 jaroj.

Nun, per ret-radio (Real Audio) oni povas aŭskulti P. R. en kiu ajn loko de la terglobo. Pola Radio disaŭdigas en ESPERANTO kvar fojojn tage la sam-enhavan elsendon:

09h30 nur per satelito (detaloj ĉi sube)

14h30: 41 m; 41 m (7285,7275 kHz)

19h00 41 m (7205 kHz)

20h00 nur per satelito (detaloj ĉi sube)

Nun estas uzata la satelito Eutelsat II F6- Hot Bird- 13 gradoj de la orienta latitudo.

Frekvenco 11,474 GHz; polarizado horizontala (H); subportanto 7,38 MHz.

(Plus unu horo vintre.)

Sonrevuo por nevidantoj

En 1995 ekaperis en Rusio 90minuta sonrevuo "Voĉo de Amikeco". En unu jaro aperas 4 numeroj. Vi povas ekscii pri E-movado en Rusio kaj eksterlande, aŭdi kantojn kaj literaturaĵojn, sonigitajn artikolojn el E-periodaĵoj. La revuo havas abonantojn en 12 landoj de Eŭropo kaj Azio; la abonprezo por 2000 estas 8 dolaroj aŭ egalvaloro (aparta ekzemplero kontraŭ 2 dolaroj). Por mendoj: Vladimir Rassoĥin / ab/ja 96, RU-352900 Armavir -Rusio

aneko@krintel.ru

Jen interesa iniciato por izolitaj esperantistoj. Bonvolu sciigi!

KD-fakvortara

MultiDisc, KD-Romo por Vin-
dozo 95, entenas pli ol 50 fakvort-
arojn francajn-E-francajn.

Temas pri agrikulturo, anatomio,
antaŭnomoj, arkitekturo- konstru-
ado, arkeologio, artoj, astronomio,
aviado, botaniko, ĉasado, fervojoj,
kemio, kuirado, ekonomiko, elektro-
elektroniko, entomologio, famili-
araj vortoj, figuraj vortoj, fotografio-
optiko-kino, geografio, geologio,
gramatiko, heraldiko, historio,
iktiologio, iloj-maŝinoj, komputiko,
juro, landoj-loĝantoj-lingvoj, lik-
vajoj, literaturo, maro, matematiko,
medicino, meteologio, milito, mine-
ralogio, mitologio, muziko, ornito-
logio, propraj nomoj, profesioj,
proverboj, religioj, sportoj-ludoj,
tekniko, telekomunikoj, televido-
radio, titoloj, vehikloj, vestaj oj,
zoologio.

Informas: Christian Bertin, La
Benairie, Route de Servon, FR- 35410
Chateaugiron.



Someraj staĝoj 2000 en Kastelo Grésillon

Kastelo Grésillon, FR-49150 BAUGE

Tel.02.41.89.10.34 Poŝtkonto Nantes 1485 39 P

Julio :

15-21 : E°-kursoj (3 gradoj), kantado, piedmigrado

24-29 : kursoj (2 gr), teatro-praktikado, piedmigrado

Aŭgusto :

31/7-5/8 : E-kursoj (2gr) - prelegoj (G.Lagrange)

7-12 : E-kursoj (2 gr) ; peckudrado

14-19 : E-kursoj (2 gr) ; joko

Malgraŭ iuj asertoj Grésillon plu vivas.
Volontuloj kaj entreprenoj realigas la
laboraĵojn postulatajn de la sekurkomisiono.
Jen la provizora programo por julio /aŭgusto

Kosto de ĉiu staĝo : 180 F. Alĝo al la asocio : 50 F.
Mangoj kaj loĝado estas aldonoj, lau aranĝo : en la
Kastelo mem (se eblas), en hoteloj, ferioĉambroj en
Privataj domoj, kampadejoj ĉe la kastelo an publikaj

Esperanto-gazetoj
en interreta eldono

KIOSKO

<http://www.esperanto.se/kiosk/gazstarto.html>

| 'Vera orminejo' (Internetguiden 98.7) | 'Elstara' (Internetworld 98.8) |

Pere de KIOSKO vi povas legi informojn el la tuta mondo, unuavice en gazetoj, kiuj aperas en la lingvo(j) de la lando. Ni kontrolas regule, ke la ligiloj funkcias. Se vi rimarkas, ke iu adreso estas malaktuala, bonvolu informi nin. Kaj se vi konas pliajn gazetojn, bonvolu sendi al ni iliajn ttt-adresojn.

Metu ligilon al KIOSKO en via retejo. Vi nur bezonas aldoni jenajn kodliniojn:

```
<CENTER><A HREF="http://www.esperanto.se/kiosk/" TARGET="nova">  
<IMG SRC="http://www.esperanto.se/kiosk/kigif/kireo.gif"></A></CENTER>
```

kaj aperos tie jena bildsekvenco:

Legu la ĉiutagajn novaĵojn
en la lingvoj de la landoj en



NORDA GAZETO

SUPLEMENTO POR KOMENCANTOJ

Ne, vi ne sonĝas ! "Suda Gazeto" (Sudfrancia Stelo) estas "Norda Gazeto" kaj inverse ! Esperantio ne konas limojn, ĉu ? Ni interŝanĝas nun nian bultenon kun tiuj de aliaj federacioj kaj de tempo al tempo uzos materialon el aliaj federacioj . Bonan legadon al komencantoj !

ESPERANTO EN SANKT-PETERBURGO

FACILA



deligitino⁶ de UEA en sia urbo, S-ino Nelli Kublanova, kaj ŝia amikino Valeria Cvetkova. Telefon-vokitaj de nia rusa gvidistino, ili al-kuris al nia ŝipo kaj proponis⁷ al mi sian helpon. Ili demandis min, kion mi deziras. Mi respondis, ke mi ŝatus viziti la faman "Perspektivon Nevski", la plej faman avenuon⁸ de tiu urbo. Kaj ili afable promeniĝis min kun multaj klarigoj. Sed kompreneble⁹ ni ne parolis ruse, sed Esperante, kaj tiel mi komprenis ĉion, kion ili diris al mi. Mi ne perdis unu vorton. Do Esperanto plene ludis sian rolon de perfekta komunikilo¹⁰ kaj mi pasigis kelkajn agrablajn horojn. Tio ne eblus, se mi estus provinta komuniki per la rusa. Esperanto liberigis nin kaj donis al ni (al tiuj sinjorinoj kaj al mi) la ĝojon kompreni unu la alian en lando kun malfacila lingvo kaj kie malmultaj homoj parolas france. Tiu bela posttagmezo en Sankt-Peterburgo klare montris, kio okazus, se ĉiuj homoj lernus Esperanton, apud sia propra gepatra lingvo¹¹. Oni devas danki Doktoron Zamenhof, kiu donacis al ni tiun belan kaj utilan lingvon: Esperanton !

Daniel LUEZ

Mi havis la ŝancon¹ fine realigi² tre malnovan revon mian: viziti Ruslandon ! La rusan lingvon mi lernis dum multaj jaroj, kaj mi estas kapabla legi, skribi kaj iom paroli ĝin. Mi do esperis kompreni la rusojn parolantajn sian lingvon. Sed mi devis konstati³, ke mi fakte⁴ ne komprenis tion, kion oni respondis al mi! Sed, feliĉe, estas esperantistoj en ĉiuj landoj, eĉ en Ruslando, kaj kiam mi estis en Sankt-Peterburgo, komence de mia vojaĝo, mi povis rendevui⁵ kun du esperantistinoj,

1. ŝanco: chance
2. realigi: formé sur reala (réel) et le suffixe -igi (faire, rendre) donc: réaliser
3. konstati: constater
4. fakte: en fait
5. rendevuo: rendez-vous rendevui: avoir rendez-vous
6. delegito: délégué delegitino: déléguée
7. proponi: proposer
8. avenuo: avenue
9. kompreneble (mot à mot: compréhensiblement) bien entendu, naturellement
10. perfekta komunikilo: un parfait instrument de communication (sur: komuniki: communiquer)
11. gepatra lingvo: langue maternelle (littéralement: "langue des parents" ... de la gepatroj)


Ni ridu ...

TRE FACILA


Kamp-ar-ulo trovas knab-eton en unu el siaj pom-arboj:
- Knab-aĉo ! Ek-krias li, mi tuj iros serĉi vian patron !
La knab-eto ek-rigardas al la plej-alt-aĵo de la arbo kaj diras:
- Paĉjo, estas sinjoro kiu volas paroli kun vi...

Annie VANWALLEGHEM

KRUCVORTOJ



Solvej de la 151-a



HORIZONTALE

- I) Ekonomia influant(o) .
- II) Vi aŭ mi .
- III) S : Rimarko / Dens-kontraŭul(o) .
- IV) Atmosfer(o) .
- V) Unuaj literoj de Upaniŝadoj / Haŭta malsan(o) .
- VI) S : Do, re, la, ekzemple / Moru(o) .
- VII) Tekuket(o) / Kiel fama konferenco .
- VIII) Numeralo / Kiel somera piko .
- IX) Helena ord(o) / Amerika reĝ(o) .
- X) S : Interloko / Marlili(o)

s : sone

VERTIKALE

- 1) Inflammbla mukoz(o) .
- 2) Insektaro .
- 3) S : Ligilo / Ĉina urb(o) .
- 4) Fama dialekto / Alvoka interjekcio / Blek(i) .
- 5) Akord(o) / s : Besta ŝelo .
- 6) Renversita bakaf(o) / Forpela interjekcio .
- 7) Suferkultant (o) / Ne tiel .
- 8) Sahar(o) .
- 9) Ost(o) aŭ mezurunu(o) / Kaserol(o) / Litero aŭ gotermin(o) .
- 10) Esperantian(o) devige ???

BOPARO

NI PROVU RIDETI !

SOURIONS... SI POSSIBLE !



Du knaboj eniras la flegejon de la lernejo. La flegistino informiĝas apud la unua: "Kio okazis al ci, karuleto?"

- Mi englütis nevole lud-globeton el ceramiko...

- Kvietiĝu, ne gravas, sufiĉas esti pacienca..." Ĉi okulumas al la dua: Nu, ankaŭ ci malbone mienas. Kio trafis cin?"

- La lud-globeto apartenas al mi... Mi atendos ĉi-tie la necesan tempon..."

el "la Informilo"



Du soifuloj sidas ĉe tablo en trinkejo. Unu emfazas pri la kvalitoj de sia hundo: "Mia helpema "Sankta Bernardo" estas ja vere elstara besto..."

- Kial do?

- Ĉiumatene ĝi alportas al mi la ĵurnalon!

- Hej! Kio eksterordinara je tiu afero?

- Sed... mi tute ne abonas la gazeton!.."

el "la Informilo"



Limdato por la venonta SFS, kiu aperos fine de junio, estas sabato 17a junio. Sendu viajn kontribuojn al :
 S F S Jean HENIN - Beauregard- Route de Montcayroux 48500 La Canourgue
 Tel/Fakso: 0466328636 Jean.Henin@wanadoo.fr Anticipan dankon!